Heinrich Neye,

Somer-deziroj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Firme vivas en ni bildo,
kia estu la somer':
taga varmo, nokta mildo,
ege plaĉa la veter'.

Kuŝseĝego kaj sunbrilo,
tendumado kaj banej',
gren-rikolt', arbar-trankvilo,
varmo kaj bier-gastej'.

Daŭre alta aer-premo,
nur nubetoj ce l' ĉiel',
glaciaĵo kaj trinkemo,
ŝvitas ni sub sun-ombrel'.

Akvoskio, ondo-rajdo,
ĉiel-bluo, plaĝ', bikin',
konkoj, sanĝiĝanta tajdo,
sunbrulumo je la fin'.

Firme vivas en ni ĉiuj
tiu bunta mozaik';
Plaĉas ĝi al tiuj, kiuj
vivas en ĉi republik'.

...

Traduko de la Germana poemo "Sommerwünsche" de Heinrich Neye *(∗1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2005-08.25.*

MR-439-1 / Arg-325-658 (2005-08-26 14:33:21)